



aũtuno, 1968



J. E. N. -

B U L T E N O

1/1968

Redaktoro:
Robert Rothenmeyer

Senpaga por
membroj de JEN

Sendu materialon al:
S-ino Julie Tonkin
2131 Tryon Street
Philadelphia, Pa. 19146

FINFINE denove la JEN-Bulteno eldoniĝas. Kial la antaŭa malapero? Malbonsance estas ĝeno aperigi gazeton, eĉ iun kiel ĉi tiun. Iu persono devas verki artikolojn, iu devas redakti ilin, iu devas maŝin-skribi sur stencilojn, iu devas multoblige, iu devas kunmeti la paĝojn, kaj fine, iu devas enpoŝtigi ĝin. Ĉio ĉi devas esti farata tute de volontuloj--tre maloftaj specimenoj. Nun, ni streĉas por prezenti tiun ĉi humilan gazeton. Tiu ĉi numero estas precipe kunmetaĵo el diversaj est-raraj verkaĵoj. Tamen, ni esperas, ke estontece tiu ĉi estos gazeto de la membraro (el la membraro, por la membraro, ktp.). Do, ni alte taksos iujn ajn verkaĵojn, kiujn iu ajn membro povas kontribui. Se vi deziras ke per-Esperanta gazeto daŭru, tia helpo estos necesa. En la nuna numero vi eble trovos interesaĵojn; se jes, skribu al la redaktoro pri ili. Se ne, tiam verku mem la interesaĵojn kaj sendu ilin al la redakcio. La adreso de la redakcio troviĝas ĉi-apude. Memoru: la sukceso de la JEN-Bulteno dependas de la kunlaboro de la JEN-membraro.

2.

ESPERANTISTO DE LA MONATO

JEN-INTERVJUO: James Stockbridge
interparolo kun juna Esperanto-parolanto

James Stockbridge (Jay) nun diplomigâs el la Universitato de Massachusetts ĉe Amherst, Mass., kaj estas forironta el sia patrujo, eble poreterne. Por ekscii pri liaj projektoj kaj opinioj pri Esperanto, JEN okazigis la jenan intervjuon.

JEN: Ni eksciis ke vi intencas iri eksterlanden post via diplomigo.
Ĉu vi bonvolas klarigi viajn planojn kaj kialojn?

Stockbridge: Baldaŭ, mi planas vojaĝi al Novzelando, por plua studado. Se la lando plaĉas al mi, mi eble loĝos tie travive.

JEN: Kial vi elektis Novzelandon?

Stockbridge: Oni tre bezonas kontrolistojn pri sovaĝaj bestoj tie, ekzistas tie multe da interesaj bestoj observindaj, kaj ankaŭ ekzistas multe da oportunaj ŝancoj por persono kiel mi. Plue, mi volas de proksime vidi belan landon.

JEN: Ĉu vi spertis iujn interesaĵojn en via fako?

Stockbridge: Unu someron, mi laboris en la bestĝardeno de Benson, en New Hampshire. Tie mi nutris la bestojn kaj purigis iliajn kaĝojn. Tre malaltranga laboro. Sed, pasintsomere, mi laboris en marbiologia esploro sur Kabo Cod.

JEN: Ĉu tiuj interesaĵoj kondukis vin al iuj aliaj pridirindaj spertoj?

Stockbridge: Jes. Dum mi loĝis en studenta loĝejo en la Universitato de Massachusetts, mi havis dorlotbeston en mia ĉambro: unumetra boao. Sed tenadi bestojn en la loĝejoj kontraŭas la universitatajn regulojn, do, mi devis, kaj sukcesis, kaŝi la ĉeeston de la serpento for de ĉiu studento en la loĝejo krom la samĉambrano. La nomo de la serpento estas "Puff" kaj li estos ĝojigita se li vidos sian nomon en la JEN-Bulteno.

JEN: Jehĥ! Ni ŝanĝu la temon. Kiel vi eksciis pri la ekzisto de Esperanto?

Stockbridge: Nu, mi ĉiam interesiĝis pri lingvoj. Mi ofte legis sciencfikcion, kaj mi precipe trovis interesaj la artefaritajn lingvojn de Edgar Rice Burroughs, kiujn li kreis en siaj romanoj. Li eĉ verkis plenajn vortaretojn. La ideo de homfarita lingvo, simpla kun malmulte da reguloj, allogis min. Mi ekpensis, ke mi mem eble penos krei lingvon. Tiam, iu amiko en la Universitato diris al mi, ke tio estas jam farita: Esperanto, kompreneble. Do, mi mendis lernlibron (Teach Yourself Esperanto) kaj lernis la lingvon. Tio okazis antaŭ proksimume tri jaroj.

JEN: Kion vi jam faris per Esperanto?

Stockbridge: Mi verkis kelke da poemoj. Mi estas membro de UEA kaj estis membro de ELNA.

JEN: Kial vi ne aliĝis al JEN?

Stockbridge: Mi ricevis News Digest senpage, do mi opinias, ke ne estas necese, ke mi aliĝu. Krome, mi estas forironta al Novzelando.

JEN: ((Tio estas pro lia iama membreco de ELNA.)) Kial vi ŝatas Esperanton?

4.

Stockbridge: Ĝi plaĉas al mi.

JEN: Laŭ via opinio, kiom Esperanto progresos?

Stockbridge: Mi esperas, kiel ĉiu persono, ke ĝi iam plenumos sian intencitan rolon--tio estas, esti ponto super la fendo inter la diversaj landoj. Dum malamo kaj malfido ekzistas inter la popoloj, tiel ke oni ne povas elekti unu nacian lingvon de alia, Esperanto havos bonan okazon, ĉar ĝi restos la sola elektindaĵo.

JEN: Dankon. Kaj bonan ŝancon en Novzelando.

--- ---

GRAMATIKA ANGULO

Duklasaj Radikoj. Laŭ Montagu Butler, en lia antaŭnelonge eldonita vortaro, ekzistas kelke da duklasaj radikoj, t.e. radiko kiu ne estas unu gramatika ero. La duklasa vorto pritraktota ĉi tie estas "korekti," kies difinaĵo estas, laŭ la Plena Vortaro, "regŭstigi la erarojn, difektojn de iu aŭ io." Laŭlogike, se "korekti" signifas "regŭstigi," tial, "korekta" signifas "regŭstiga" (angle: corrective), kaj "korekte" signifas "regŭstige" (angle: correctively). Sed, kutime oni uzas "korekte" tiel ke ĝi senbezone signifas "gusta" aŭ "senerara," kvazaŭ la baza radiko estas adjektivo. Tial, por doni al la afero pli da logiko, Butler espere sugestis, ke oni uzu la vorton "korekta" tiel ke ĝi signifas "gustiga," kaj je la alia okazo, oni uzu "gusta" aŭ "senerara."

Okazo kaj Oportuno. Kvankam la adjektivo "oportuna" estas la Esperanta ekvivalento de "opportune," la uzado de la vorto "oportuno" estas evitinda kiam oni celas la anglan vorton "opportunity." Por parolantoj de aliaj lingvoj "oportuno" ŝajnas esprimi "opportune thing." Por eviti konfuzon, uzu la vorton "okazo": "Tiu estas bona okazo"--"a good opportunity."

CINKVENCOJ

La "cinkvenco" (cinquain) estas formo inventita de usona poetino Adelaide Crapsey. Ĝia ordo estas laŭsilabe: 2-4-6-8-2. Jen du cinkvencoj verkitaj de JEN-ano.

La lun'
 ŝvebas super
 kliniganta salik';
 la voĉo de la amitin'
 eĥas.

Amik'
 elsonigas
 sondiskon Hinduĵan.
 Kial mi belajn memorojn
 timas?

--Mark Mandel

POSTKONGRESO EN SAN FRANCISCO

La Estraro de ELNA, la usona nacia Esperanto-asocio, aprobis la peton de SFERO (Esperanto-organizo por la regiono de la urbo San Francisco) inviti la postkongreson de UEA al San Francisco en 1972, la jaro kiam la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Portland, Oregon. Frank Lanzone, prezidanto de SFERO, farante la formalan peton dum la ELNA-Kongreso en Covina, aldonis la jenajn rimarkojn, kiuj eventuale konvinkos ankaŭ niajn legantojn partopreni tiun ĉi gravegan internacian eventon.

"Kial San Francisco valoras vian viziton? San Francisco estas unika inter multaj usonaj urboj, kiuj suferas pro sameco. Fizike bela pro la montoj kaj golfeto kaj la konstantaj karesoj de la pacifika Oceano, en somero malofte ĝi estas tro varma. Do, unika, bela, komforta urbo.

"San Francisco estas fama pro multaj internaciaj restoracioj kiuj servas vastan internacian klientaron. El la vinfabrikejoj de Norda Kalifornio venas ekzotikaj vinoj kiuj ravas la gustumanton kaj inspiras la talenton de niaj poetoj. Ili faras la urbon fama en kanto kaj verso. Do, unika, bela, komforta, gastronomie perfekta, bakanala kaj kantinda urbo.

"Multaj fenomenoj vidis la taglumon unue en San Francisco. La Unuigintaj Nacioj naskiĝis en San Francisco, Ankaŭ la 'florinfanoj.'

"Eble de tempo al tempo vi aŭdis raportaĵojn pri tertremoj. Ne kredution. Tio estas nur la bruego de klientoj kiuj aplaŭdas mane kaj piede la fizikajn allogaĵojn de la senĉemizaj kelnerinoj kaj la dancistinoj 'iru-iru' (go-go). Kompreneble se tiuj belulinoj pinĉas vian koron, vi rajtas . . . pinĉi iliajn sidlokojn.

"La anoj de SFERIDO, la junulara sekcio de SFERO, ofere me pretiĝas instrui al ili Esperanton. Bedaŭrinde, pro mia juna aĝo mi ne rajtas iri al tiaj lokoj, sed tio ne forrestigu vin.

"Do, San Francisco estas la unika, bela, komforta, gastronomie perfekta, bakanaĵa naskiĝloko de la Unuigintaj Nacioj, florinfanoj kaj toplesaj (senĉemizaj) kabaredoj.

"Nu, kio estas por la virinoj en San Francisco? Kompreneble viroj kiuj montros al ili la bonvivon. Kaj magazenoj. Jes, magazenoj plenshopitaj de allogaj aĉetindaĵoj. Vi fajfos pro admiro!

"En nia modesteco ni ne volas tro fanfaroni nian urbon, sed certe, post ekzameno de la afero, vi konkludos, kiel ni, ke se io estas bona--ĝi ne nur troviĝas en San Francisco--sed probable San Francisco iniciatis ĝin.

"Memoru: post vizito ĉe ni, vi diros kiel la kanto, 'Mi lasis mian koron en San Francisco.'"

PAI KI HO estas 26-jara farmaciisto, kiu laboras en farmaceŭta fabriko en Seoul, Koreo. Por plialtigi siajn studojn, li deziras labori en Usono, aŭ en kuracejo, aŭ en farmaceŭta fabriko, aŭ en kemia fabriko. Li ankaŭ serĉas "patronadon financan" en Usono por labori kaj studi. Lia adreso: Pai Ki Ho, 68-4 Song Woldong, SSD, Seoul, Koreo.

ŜAKTIGROJN kaj, precipe, ŝakŝafojn oni invitas aliĝi al Esperanta Ŝakligo Internacia (EŜLI) per alsendo de \$1.00 kiel jarkotizo al ties peranto usona: R.C. Marble, P.O. Box 545, Reseda, Ca. 91335. Inkl. bultenon.

LINGVO-ESPLORADO

D-ro Barney Emmart, profesoro de ĵurnal-scienco ĉe la Universitato de Massachusetts kaj diligente laboranta esperantisto, nun pretigas artikolon por la eldonaĵo de C.E.D. La Monda Lingvo-Problemo. C.E.D. estas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kaj ĝia sidejo estas en Londono. La unua numero de la nova gazeto, kune eldonota de la eldonejo Mouton, en Hago, aperos en decembro.

D-ro Emmart estis unue interesata pri publikopiniaj enketoj. Sed, li dubis pri ilia taŭgeco al la hodiaŭaj opinioj de la homoj. La opinioj pri lingvaj problemoj, enketite antaŭ jaroj, ŝanĝiĝis intertempe, kaj tiuj malnovaj enketoj estas nun ne multe valoraj.

Do, d-ro Emmart ekstudis la celojn de tiuj kiuj jam studis Esperanton kaj de tiuj kiuj nun studas aliajn fremdajn lingvojn. Li donis demandaron al kvarajaraj lingvostudentoj ĉe la Universitato, supozante ke personoj kiuj persiste studadis lingvon havas firman intencon.

Responde al la demandaro, duono ŝatis la ideon, ke estu iu internacia lingvo. Kvinono menciis Esperanton, sed neniu estis lerninta ĝin. La kialoj estas resumeblaj je unu fakto: la demandito jam uzis tempon kaj penojn por lerni la lingvon kiun li studis. Interesiĝo pri tiu lingvo ofte komenciĝis pro "bona" instruisto, plej ofte en la gimnazio, aŭ pro devigo studi lingvon. Lia studado pri la motivoj de Esperanto-lernintoj ne estas tute finita, sed ili estas probable aliaj, ol la motivoj por aliaj lingvoj. Post la finiĝo de la esplorado, d-ro Emmart esperas ke la eltrovaĵoj helpas al esperantistoj trafe direkti sian informadon.

Ni deziras al d-ro Emmart bonan sukceson, kaj ni esperas ke nia legantaro legos la rezultojn de lia esplorado en la nova LMLP.

LA MALGRANDA PRINCOAntoine de Saint-Exupery

Kaj tiam aperis la vulpo:

-Bonan tagon, diris la vulpo.

-Bonan tagon, diris la princeto.

-Ĉi tie, diris la vulpo, sub la pomarbo.

-Kiu ci estas, diris la princeto...ci estas tre bela.

-Mi estas vulpo, diris la vulpo.

-Venu ludi kun mi, al li proponis la princeto, mi estas tre malfeliĉa.

-Mi ne povas ludi kun ci, diris la vulpo, mi ne estas enligita.

-Ha! Pardonu min, diris la princeto, sed post pensado li ekdiris:

-Kio estas 'enligi'?

-Ci ne estas de ĉi tie, diris la vulpo. Kion ci serĉas?

-Mi serĉas homojn, diris la princeto. Kio estas 'enligi'?

-Homoj, diris la vulpo, ili havas pafilojn kaj ĉasas. Tio estas granda ĝeno. Ili kreskigas kokojn. Ilia sola intereso. Ĉu ci serĉas kokojn?

-Ne, diris la princeto, mi serĉas amikojn. Kio estas 'enligi'?

-Estas io tre forgesata, diris la vulpo. Signifas 'igi ligojn'....

-Igi ligojn?

-Certe, diris la vulpo. Ci estas por mi simple knabeto tute sama je mil aliaj knabetoj. Kaj ci ne bezonas min. Kaj mi ne bezonas cin. Mi estas simple vulpo simila je mil aliaj vulpoj. Sed se ci enligas min, ni bezonos unu la alian. Ci estos por mi unika en la mondo. Mi estos por ci unika en la mondo.

-Mi komencas kompreni, diris la princeto. Estas floro...mi pensas ke ĝi min enligis.

-Estas eble, diris la vulpo. Oni vidas surtere ĉian aĵon.

-Ho, ne estis sur la tero, diris la princeto.

La vulpo mienis scivolemon.

-Sur alia planedo?

-Jes.

-Ĉu ekzistas ĉasantoj sur tiu planedo?

-Ne.

-Ho! Tio estas interesa. Kaj kokinoj?

-Ne.

-Nenio estas perfekta, flustris la vulpo.

Sed la vulpo revenis al sia ideo:

-Mia vivo estas monotona. Mi ĉasas la kokinojn. La homoj min ĉasas. Ĉiuj kokinoj samaspektas, kaj ĉiuj homoj samaspektas. Mi enuas do iomete. Sed se ci min enligos, mia vivo kvazaŭ lumigōs. Mi rekonos unu paŝsonon kiu ŝajnos diferenca je ĉiuj aliaj. La aliaj min irigos subteren. La cia min elvokos de la tero kiel muziko. Kaj rigardu do! Ci vidas tie la kampon de tritiko? Mi ne mangas panon. La tritiko por mi ne utilas. La kampoj de tritiko por mi alvokas memoron de nenio. Kaj tio ja estas bedaŭrinda. Sed ci havas hararon koloran je oro. Ja estos bonege kiam ci min enligos! La tritiko kiu estas ora min rememorigos pri ci. Kaj mi amos la sonon de vento en la tritiko. La vulpo restis kviete kaj longe alrigardis la princeton.

-Mi petas...enligu min! li diris.

-Mi volus multe, diris la princeto, sed mi ne havas multe da tempo. Mi devas trovi amikojn, kaj multajn aĵojn ekkoni.

-Oni konas nur la aĵojn kiujn oni enligas, diris la vulpo. Homoj ne plu havas tempon por ekkoni ion. Ili aĉetas ĉiajn aĵojn jam faritajn ĉe vendistoj. Sed, ĉar ne ekzistas vendistoj de amikoj, homoj ne havas amikojn. Se ci volas iun amikon, enligu min!

-Kion mi devas fari, diris la princeto.

-Ci devas esti pacienca, respondis la vulpo. Ci sidos iom malproksime al mi, tiel, sur la herbo. Mi cin rigardos el la angulo de la okulo, kaj ci nenion diros. La lingvo estas la fundo de miskompreno. Sed ĉiun tagon ci povos pliproksime sidi.

La morgaŭon revenis la princeto.

-Estus pli valore reveni je la sama horo, diris la vulpo. Se ci venas ekzemple, je la kvara posttagmeze, mi komencos feliĉigi je la tria. Ju

pli proksimiĝas la horo, des pli mi estos feliĉa. Je la kvara, mi jam agitiĝos. Mi komprenos la bonvolon. Sed se ci venas iam ajn, mi ne scios je kioma horo vesti mian koron...Necesas ritoj.

-Kio estas rito?

-Tio estas ankoraŭ io tro forgesita, diris la vulpo. Ĝi estas tio, kio diferencas unu tagon de alia. unu horon de aliaj. Estas rito, ekzemple, ĉe miaj ĉasantoj. Ili dancas ĵaŭde kun knabinoj de la vilaĝo. Ĵaŭdo do estas tago bonega. Mi promenas ĝis la ĉirkaŭo. Se la ĉasantoj dancus iam ajn, la tagoj ĉiuj inter si similus, kaj mi havus nenian ferion.

Do, la princeto enligis la vulpon. Kaj kiam la horo de foriro alproksimiĝis:

-Ho, diris la vulpo, mi pleros.

-Estas cia kulpo, diris la princeto, mi volis nenion malbonan, sed ci volis, ke cin mi enligu.

-Certe, diris la vulpo.

-Do, ci nenion gajnis!

-Mi gajnis, diris la vulpo, pro la koloro de tritiko.

Sekve li ekdiris:

-Iru por revidi la rozojn. Ci komprenos ke la cia estas unika en la mondo. Ci revenos por adiaŭi min, kaj mi donacos al ci sekreton.

Kaj li revenis al la vulpo:

-Adiaŭ, li diris.

-Adiaŭ, diris la vulpo. Jen mia sekreto. Ĝi estas tre simpla: oni povas bone vidi nur per la koro. La gravo ne estas videbla je la okuloj.

-La gravo ne estas videbla je la okuloj, ripetis la princeto, finfine rememorante.

-Estas la tempo kiun ci perdis por cia rozo kiu faras tiel grava cian rozon.

-Estas la tempo kiun mi perdis por mia rozo...diris la princeto, finfine

rememorante.

-La homoj estas forgesintaj ĉi tiun veron, diris la vulpo.

-Sed ci devas ĝin forgesi neniam. Ci iĝos respondeca ĉiam je tiu kiun ci enligas. Ci estas respondeca je cia rozo....

-Mi estas respondeca je mia rozo...ripetis la princeto finfine rememorante.

(tradukis: JEN-ano)

LA MONDA LINGVO-PROBLEMO estas nova internacia, interdisciplina scienca revuo deducita al ĝenerala pristudo de la lingva problemo.

Ĝia celo estas: kunigi sub unu sama kovrilo tre diversajn esplorojn kaj diskutojn fundamente gravajn por ĉiuj lingvistoj, edukistoj, leĝfarantoj, administrantoj k.a. interesitaj pri lingva planado, t.e. pri la elekto kaj efektivigo de difinitaj programoj rilate la uzon de lingvoj. Tiucele ĝi pritraktos la lingvan problemon el la vidpunktoj de sociologio, lingvistiko, juro, psikologio, ekonomio, kaj politiko.

Sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (London-Rotterdam), LMLP aperigos originalajn studojn en diversaj naciaj lingvoj, kun resumoj en Esperanto, plus recenzoj kaj notoj laŭbezone.

Abonkotizo por unu jaro/volumo: \$7.00 (25 ned. guld.) a frankite; pagebla rekte al Mouton, Postbox 1132, Den Haag, Nederlando, aŭ per kiu ajn lib-rejo aŭ peranto (ankaŭ per CED, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando). Abonu mem la revuon, aŭ certigu, ke via universitata aŭ urba biblioteko ricevos ĝin. Se vi studas lingvojn, sociologion, aŭ kiun ajn rilatan temon, nepre menciu la revuon al viaj profesoroj.

LA KATO

Fantomo de l' nokto,
 Spirit' de silentaj stratoj,
 Insidas nevideble en la ombroj.

Kusenataj piedoj ne sonas;
 Neniu vidas lian siblantan voston;
 Li estas simfonio de movo.

Li haltas apud malferma fenestro,
 Ekflaras la trankvilan aeron,
 Kaj kaŝcasas silente for.

--James Stockbridge

MI AUDAS USONON PLEDAĈI

Luther B--- paŝis el sia klimatizita domo
 Rekte en sian klimatizitan aŭton.
 Li veturis, fermit-fenestre, al sia klimatizita oficejo.
 Revenante, li haltis ĉe klimatizita trinkejo,
 Kaj pasigis la vesperon en klimatizita kinejo.
 "La afero," li diris, "kiu ŝajne estas la plej maljusta---
 Mi devas piediri, neprotektate, de mia aŭto al la pordo.
 Ĉio estas klimatizita krom la aero."

--Morris Bishop
 (tradukis JEN-ano)

14.

NIA POŝTKESTO

Estimataj Samideanoj,

Ĉe Dunedin, Nov-Zelando, estas ĉiujara Festa Semajno - Arto, Muziko, Teatro, Procesio, ktp., kaj esperantistoj decidis prezanti bonegan Elmontron de desegnoj de infanoj el ĉie en la mondo (ni esperas!) kaj ni petegas vian helpon disvastigi ĉi tiun informadon en via lando.

Ni deziras konvinki la edukajn instancojn enkonduki Esperanton en la lernejoj ĉi tie, kaj ni esperas, ke ĉi tiu Elmontro montros kiel grava estas Esperanto por interkomunikigi ĉiujn landojn.

S-ino Enid Allen
prez. E-Klubo de Dunedin

Sendu desegnojn aerpoŝte al: Esperanto-Klubo, P.O.Box 838, Dunedin,
New Zealand,

Antaŭ 30 novembro 1968

Temo: "FESTO"

Skribu sur la dorsflanko de la desegnoj: nomon, aĝon, lernejon, kaj landon.
Ne estas necesa esti esperantisto!

Virino: Tiu foto aspektigas min pli maljuna, ol mi estas.
Fotisto: Tiel vi ŝparos elspezon, evitante postanfotigon.

DEZIRAS KORESPONDI

Pollando. Viro 25-jara, teknika mekanikisto, interesigas pri fotografado, turismo, muziko, filmo, teatro, lingvistiko, sporto, moderna tekniko, ktp. Regule legas popularsciencajn artikolojn kaj kolektas prospektojn aŭtomobilajn. Li interŝanĝas bildkartojn, poŝtmarkojn, kaj gramofondiskojn. Witold Konarewski, ul. Warszawska 46 m.11, CZĘSTOCHOWA.

Ĉeĥoslovakio. Junulo 18-jara deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Vladimir Dydrych, JAROMEČ II-Josefon.

Lia kuzino estas direktistino de antaŭlerneja edukejo. Interesoj: muziko, legado, rusa kaj germana lingvoj. S-ino Dagmar Mlejnkova, V zahradach 98, JAROMEČ IV.

Hungarujo. Grupo de dek junaj geesperantistoj (proks. 20-jaraj), kun diversaj interesoj, deziras korespondi kun simila grupo en Usono. Gabor Bekessy, Török Floris u. 84.I.3, BUDAPEST XX.

Sovetunio. Esperanto-klubanoj, diversaj interesoj; inkluzivas studentojn, aspirantojn, kaj ankaŭ sciencistojn 20- ĝis 35-jarajn. Klub Esperanto, Potje-9, KIEV.

La gvidanto de la supre menciita klubo, 27-jara matematikisto, ĉe la Ukraina Akademio, deziras interŝanĝi gramofondiskojn, bildkartojn, fotojn, poŝtmarkojn, kaj volas legi anglajn librojn (nepolitikajn). Jaroslav Matvijiŝjii, Do vostzebovanja, KIEV-1.

Ĉeĥoslovakio. Deziras korespondi kun junulino ne pli maljuna ol 25-jara Horymir Švarc, Polom 64a, Okres Přerov.

SENDU VIAJN KORESPONDPETOJN al la Koresponda Servo de JEN: f-ino Ellen Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Mass. 02146.

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO (JEN)
 4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349, Usono

Estraro 1968/69: Peter Benson, Bruce Landon, Jonathan Pool
 Humphrey Tonkin, Julie Tonkin

Membrokotizoj: \$2.00 por membroj (ĝis 30-jaraj) kaj subtenantoj
 \$1.00 por novaj membroj.

Membroj ricevas: La dumonatan anglalingvan News Digest, la JEN-Bultenon,
 kaj Asocian Membrecon de Tutmonda Esperantista Junulara
 Organizo (TEJO), la junulara sekcio de Universala
 Esperanto-Asocio.

Kotizojn sendu al: La ĉi-supra adreso de JEN.

Materialon por News Digest sendu al: Jonathan Pool 5238 South Kenwood,
 Apt 1, Chicago, Ill. 60615.

Materialon por JEN-Bulteno sendu al: S-ino Julie Tonkin, 2131 Tryon
 Street, Philadelphia, Pa. 19146.

Korespondaĵojn por JEN sendu al: S-ino Julie Tonkin.

Kotizojn por TEJO sendu al: Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Phila-
 delphia, Pa. 19146 (individuj membroj ricevas la
 Jarlibron de UEA, la monatan revuon "Esperanto", kaj
 la kvaronjaran revuon junularan "Kontakto.") Kotizo:
 \$5.60 (personoj ĝis 21-jaraj); \$7.50 (personoj 21-25-jaraj).

Inter la aliaj servoj de JEN: Daŭrinform (kelkmonata senpaga informado
 pri Esperanto, al interesatoj); Internacia Koresponda
 Kurso (direktoro: Jonathan Pool); Adresiga Servo
 (direktoro: Thomas Goodman); Magazine-a-Month (jarkotizo
 \$6.00; direktoro: Humphrey Tonkin); Koresponda Servo
 (direktorino, Ellen Lewis).

Esperanto-redaktoroj: JEN volonte interŝanĝas siajn eldonaĵojn kontraŭ
 aliaj Esperanto-gazetoj.



JEN
4 Central Street
Millers Falls, Massachusetts 01349

Return Requested
New Address Requested

DATED MATERIAL

Non-Profit Organization
U. S. POSTAGE
PAID
PERMIT NO. 5
MILLERS FALLS, MASS.
01349

